



februaro 1967

NEDERLANDA ESPERANTISTO

Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio
„La Estonto Estas Nia” - 32-a jaro n-ro 2

Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk.
Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 5,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

LINGVA DISKRIMINACIO

Artikolo 2 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj diras: „Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kiu ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, **lingvo**, religio, politika aŭ alia opinio, nacia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato”.

Intence mi akcentas la vorton „lingvo”, ĉar la fakto, ke la Universala Deklaracio emfazas la egalecon de la homoj ankaŭ el vidpunkto de ilia lingva aparteno, inkluzivas la ideon, ke lingva diskriminacio povas okazi. Kaj efektive ĝi okazas.

En siaj paroladoj kaj artikoloj la prezidanto de U.E.A. ofte venas je tiu ĉi konkludo. Vidu ekzemple la paroladon de la inaŭguro de la Esperanto-monumento en Linz (plena teksto en la ĵus aperinta verko „Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj” de Dr. Ivo Lapenna). Tie la parolanto eĉ diferencigas du formojn: objektivan kaj subjektivan lingvan diskriminacion.

Unuflanke la oficialigita privilegiita pozicio de kelkaj lingvoj super la aliaj, aliflanke la ideo, ke la lingvoj de la grandaj ŝtatoj estas pli „kulturaj”. Kun la aligita ideo, ke la kulturaj valoroj de malgranda ŝtato malpli aŭ eĉ tute ne valoras, ĉar la lingvo estas ne tiel disvastigita.

Ankaŭ ni Esperantistoj sentas la lingvan diskriminacion en la rilato Esperanto -

nacia lingvo. Kiel nederlandanoj ni povas senti ĝin al nia propra lingvo fare de la tri lingvoj de la apudaj grandaj ŝtatoj. Sufiĉas nur rigardi al la modo enplekti en nederlandan tekston fremdajn vortojn aŭ esprimojn - vidu ekzemple la abundajn anglajn esprimojn en teknikaj pritraktoj - ankoraŭ tute ne finiĝis.

Kaj kion ni faru? Ĉu areto da lingvo-purigistoj, kiaj ni Esperantistoj fakte estas, povos efiki ion, kvankam ni estas konsciaj pri la problemoj? Kiel konvinki la amason, kiu senkonscie suferas la konstantan bombardadon de tiuj „-ismoj”? Kion ni povos fari, sciante, ke flanke de la senkonscia akcepto staras la konscia kaj celita propagando por la kulturpolitiko de la tri grandaj landoj, kiuj ĉirkaŭas nin?

Por scii, kiel oni laboras malantaŭ la kulisoj, oni legu la gravan artikolon de P.C. Paardekooper en la „Vacature” de la 20-a de oktobro 1966. Mi prenu el ĝi kelkajn punktojn.

La „British Council”. Privata kaj nepolitika instanco kun buĝeto (62/63) de 80 milionoj da guldenoj. Ĝia celo estas la progresigo de la kono pri Anglujo kaj tiu de la angla en la eksterlando. En 80 landoj ĝi laboras kun propraj institutoj, kiuj instruas lokajn kapablulojn fariĝi instruisto en la angla lingvo. Fremduloj,

ASOCIAJ INFORMOJ

Kiu posedas ĉi tiun gazeton?

Se iu el niaj membroj posedas ekzemplaron de la gazeto „Jamotoko” (Indonezio) el la jaro 1928, en kiu gazeto troviĝas artikolo en Esperanto pri arkeologio, bonvolu kontakti kun mi.

Indonezia fakulo telefonis al mi, ke li urĝe bezonas la gazeton. Mi promesis fari mian eblon trovi ĝin.

W. P. Lok-van Putten.

Novaj kotizoj ekde 1-1-67:

sekcia membro	gld. 9,50
ĝenerala membro	gld. 10,—
samhejmano	gld. 4,—
junulo	gld. 5,50
abonanta N.E.	gld. 5,50
donacanto	gld. 1,— (minimume)

La ĝeneralajn membrojn kaj la abonantojn mi petas kiom eble plej baldaŭ pagi

kiuj venas en Anglujon por studi, estas helpataj en diversaj direktoj.

La „Goethe-Instituto”. Fondita en 1952. En Germanujo ĝi havas 19 institutojn, kie eksterlandanoj povas lerni la germanan. En la eksterlando estas 102 institutoj en 54 landoj. Plej grava tasko estas instrui eksterlandanojn por igi ilin instruisto en la germana lingvo.

La „Alliance Française”. Fondita en 1883. Celo estas la disvastigo de la franca en la Franca Unio kaj en la eksterlando ktp. En 85 landoj estas 1000 (mil) rondoj, kiuj per prelegoj klopodas disvastigi la francan kulton. 870 bibliotekoj kaj institutoj faras la saman. En 1963 laboris 32000 francaj instruistoj en la servo de la Alliance en la eksterlando.

Prave la verkinto de la leginda artikolo sin demandas, kion faras Nederlando. Kontraŭ la franca kurso de la NTS ne staras nederlanda kurso en ekzemple la urbo Rijssel, situanta en la nederlande parolanta parto de Francujo. En Hazebroek estas ĉe la Lycée de Flandre unu instruisto, pagita de la franca ŝtato, kiu instruas ekster la ordinaraj horoj la nederlandan lingvon al volontuloj.

Nur unu rimedo ekzistas por rompi la supre signalitajn nejustaĵojn: la tuja akcepto de ununura neŭtrala internacia lingvo; la akcepto de Esperanto!

R. S.

la kotizon resp. abonprezon por la jaro 1967.

(Poŝtĝirkonto 3 45 63 nome de „Algem. Penningm. Ned. Esp. Ver. L. E. E. N., Santpoort).

W. P. Lok-van Putten,
kasistino.

Redakcio.

La ĉefestraro ankoraŭ ne sukcesis trovi anstataŭanton por s-ro Groendijk. Ĉar li estas preta provizore daŭrigi sian funkcion de redaktoro, la redakcia adreso restas la sama: Pontanuslaan 7, Arnhem.

MABESOONE-FONDAĴO .

La enspezoj por la fondaĵo en 1966 estas jenaj:

5/1	K.B. en G.	f	2,50
	D.K.-v.G. en G.		2,50
	H.L.-K. en Fr.		2,50
12/1	Merkurio, R'dam		14,—
25/1	J.P.H. en H. (Ov.)		10,—
9/2	J.H.M. en A.		10,—
	R.M. en E.		10,—
28/3	H.K. en 's-Gr.		15,—
29/3	H.G. en A.		5,—
30/3	La Espero, R'dam		25,—
1/4	L.E.E.N. en Arnhem		25,—
	C.A.L. en Z.		5,—
20/4	E.S.O. en 's-Gr.		10,—
5/5	L.E.E.N. en Almelo		10,—
9/5	W.A.v.Th. en A.		15,—
1/6	B.R.D. en D.		25,—
17/10	H.G. en A.		5,—
9/11	L.E.E.N. en Haarlem		67,50
15/11	N.N. en Gr.		25,—
15/11	L.E.E.N. Hoogezand		35,—
29/11	L.E.E.N. en Groningen		68,—
14/11	Merkurio R'dam		9,40
29/12	J.P. en G.		2,50

Entute f 398,90

Al ĉiuj gedonacintoj koregan dankon. Por ne pli ofte ensenditaj raportoj mi petas pardonon.

J. E. Prins,
Hora Siccamasingel 294,
Groningen.
Ĝirkonto 81 58 89.

La Esperanta-traduko de la konata slogano sur p. 15 estas de s-ino C. C. Dorré, Arnhem.

EL LA SEKCIOJ.

Sekcio Groningen.

Sekr.: Bosboom-Toussaintstraat 21.


LA ZAMENHOFKUNVENO.

Dimanĉon, la 18-an de dec., la sekcio Groningen memorigis la zamenhofan tagon. La du ĉefaj programpunktoj estis la paroladoj de prof. d-ro Lapenna, prez. de U.E.A. kaj s-ro Wensing, vic-prez. de U.E.A.

Je la 15.30-a horo la prezidanto s-ro Snoek bonvenigis la parolantojn, fraŭlino Vermaas, kiu akompanis s-ron Lapenna, la raportistoj de la gazeturo kaj 70 geesperantistoj el Leeuwarden kaj el la apuda ĉirkaŭaĵo, krome du eksterlandanojn nome s-ron S. Stuit el Francujo, kaj afrikan studenton, akompanitan de li. Post kelkaj memorigaj vortoj honore al d-ro Zamenhof, s-ro Snoek donis la parolvicon al s-ro Lapenna, kies parolado temis pri la transdonado de la Peticio al la UNO. S-ro L. rakontis kiom da laboro oni devis fari antaŭ la transdonado. Multe oni korespondis, kalkulis kaj verkis statistikan resumon pri la subskriboj, aldonante memorandon pri la propono mem. Tiu devis esti en la lingvoj angla, rusa, franca hispana kaj en Esperanto. Krome oni aldonis pli detalajn raportojn pri la ekstraktaĵoj. Tiujn la U.E.A. sendis antaŭe al la ŝtataj Membroj pere de ambasadoj kaj parte al iliaj konstantaj delegacioj ĉe la U.N.

Post agrabla komuna panmanĝo estis la parolvico al s-ro Wensing, kiu klare al ni montris la vojon por varbi kaj propagandi por Esperanto. Laŭ la opinio de s-ro W. la ĉefa kondiĉo estas, ke ni esperantistoj kleriĝu en kaj pri Esperanto, por ke ni kun certeco inde kaj fundamente povu defendi Esperanton al kontraŭuloj. Tiujn oni trovas en ĉiuj medioj ĉiutagaj, inter kolegoj, najbaroj, parencoj, k.t.p. Ni esperantistoj devos kapti la okazon paroli pri kaj por Esperanto kaj scipovi diskuti pri ĝi, kondiĉe ke ni disponos pri sufiĉe da argumentoj. S-ro W. Konsilis, ke ni en la klubkunvenoj dediĉos pli da tempo por klerigi la geanojn pri Esperanto. Ni povos uzi la dokumentojn de la C.E.D. Ne sufiĉas esti nur idealistoj, kiuj timas, ke se la tuta mondo parolus esperanton, la eksterordinara estaĵo „Esperantisto” fariĝus io ordinara.

Trinkinte likvoron, Dungu ŝoforon!



Sekcio „Merkurio”, Rotterdam.

Sekr.: Willem Nagellaan 16,
Rotterdam-13.

La eldono de la belaspekta esperantlingva prospekto pri Rotterdam estis kaŭzo ke jam dufoje ĝi estis menciita antaŭ la radio.

La 29-an de decembro Radio Zagreb menciis ĝin en tre laŭdaj vortoj kaj gratulis „Merkurio”-on pro tiu eldono.

La 7-an de januaro du estraranoj de „Merkurio” estis envititaj veni al la VARA-studio por mallonga intervjuo pri la nova Esperanto-prospekto, nederlandlingve. Ni klarigis al la prizorgantoj de la VARA-programo en kelkaj vortoj la nunan signifon de Esperanto en la mondo, kaj ili vere miris, kiam ni i.a. montris la imponan verkon de Dante kun Esperanto-traduko.

Sekcio Zaandam.

Sekr.: P. L. Takstraat 64.

Nia jarkunveno okazos lundvesperon la 20-an de februaro je la oka horo en la Harmonie Rustenburg 71C. Kunportu la tagordon, kiun vi estas ricevinta.

KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ.

EŬROPA JUNULARA KONFERENCO
 19—29 aŭgusto 1967 en LA
DROMEDARO (Enkhuizen-Nederlando)

Temo: „Miljara lukto kontraŭ la maro”. Organizantoj: Nederlanda Esperanta Junularo kaj Germana Esperanto-Junularo. Programo: Prelegoj, ekskursoj, amuza vespero, k.t.p. Kotizo: 160 ned. guldenoj por la tuta konferenco. Por aliĝo kaj pliaj informoj: s-ro Wim Jansen, Röntgenstraat 32a, VLAARDINGEN, Nederlando.

52-A UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO

Tel Aviv, 2—9 aŭgusto 1967.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO.

N. 3.

Ekskursoj. La Loka Kongresa Komitato decidis okazigi dum la Kongreso du tuttagajn ekskursojn: al Jerusalemo kaj al Nazareto. La ekskursoj okazos samtempe dimanĉon la 6-an de aŭg. 1967.

Ĉar LKK povos akcepti mendojn por loĝado nur ĝis la komenco de majo 1967, estas nepre konsilinda tuja aliĝo al la Universala Kongreso por ricevi ĝustatempe la Duan Bultenon, en kiu troviĝas la mendilo por loĝado, *la sola dokumento valida por rezervi dormlokon dum la Kongreso.*

Novaj kotizoj. Ekde 1.1.1967 validas la jenaj aliĝkotizoj:

Kongr.	77,— ned. gld. (308 steloj)
Edz.	38,50 ned. gld. (154 steloj)
Jun.	24,— ned. gld. (96 steloj)
Stud.	38,— ned. gld. (152 steloj)
Blind.	31,— ned. gld. (124 steloj)

Unua Bulteno kaj Aliĝilo estas riceveblaj ĉe la Konstanta Adreso de la Kongreso kaj ĉe la diversaj Landaj Asocioj.

ESPERANTISTA KULTURA
FESTIVALO „OPAVA 1967”.

7—10 julio 1967.

OPAVA - ĈEĤOSLOVAKIO.

Omaĝe al 100-jara datreveno de la naskiĝo de Nacia Artisto Petro Bezruč, organizita de Esperanto-rondeto de Uzina Klubo Ostroj, OPAVA, sub aŭspicioj de Ĉeĥoslovaka Esperanto Komitato. Aliĝiloj kaj informoj haveblaj ĉe: Vlček František, ul. 28. října, OPAVA-Katerinky, Ĉeĥoslovakio.

INVITO AL LA EŬROPA ESPE-
RANTO - KONGRESO 1967 EN
INNSBRUCK, AŬSTRIO.

Tirola iam nomiĝis „Lando en la montaro”. La malnova nomo trafe karakterizas parton de Aŭstrio. Vehemencan forton radiadas tiu ĉi tipa Alpmontara regiono.

Potence ĝi klopodas superi ĉion meznivelan. Je sunleviĝo ekflamas la montpintoj, ardas la montneĝo, vaporas la valoj. Dum fulmotondro ektemas la montoj, fulmoj similas al flomomaro, tondrobruo sonas kvazaŭ trumpetoj de la lasta juĝo. Sed vakanta vivovolo kontraŭstaras la potencojn: La veter-abio ne kliniĝas, eĉ se tempesto rompas ĝiajn branĉojn. Vere, en Tirola la atmosfero estas plena je eksterordinara fortoco! Ĉi tie oni kuraĝiĝas kaj decidas energie.

La Eŭropa Esperanto-Kongreso 1967 en Innsbruck certe fariĝos neforgesebla travivaĵo. Temoj por diskutoj estos la „Eŭropa Esperanto-Revuo” kaj la „Eŭropa Esperanto-Servo Turisma”. Bonvolu noti: 23.-30.7.1967, Innsbruck, renkontejoj por aktivuloj kaj por multaj vojaĝemaj anoj de Esperantujo! Kongreskotizo: 210,— aŭstr. ŝil., familianoj ĝuas rabaton. Aliĝiloj kaj kongresbultenoj haveblaj ĉe Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausgasse 16, 1150 Wien, Aŭstrio.

ATENTU NIAN KARAVANON AL IZRAELO

Informoj ĉe: s-ro H. Kervers, Van Slingelandtstraat 22, Den Haag. Tel.: 54 21 86.

TRA LA LIBRARO.

NATURA NUTRADO. Aŭtoro Ole Ramby, trad. Betty Larsen, Monopola vendejo S.A.T. 67 avenue Gambetta, Paris-20. formato 13½ x 18½ cm, prezo fr. 1,20.

En la 14-paĝa broŝuro la aŭtoro konkludas, ke nia korpo estas la loĝejo de la animo, la templo de la spirito. Ni do tenu ĝin pura kaj ne uzu pro tio „malpurajn manĝaĵojn” kiel viando, ovo, fiŝo ktp. La krudnutrado kiel fruktoj kaj legomoj estu por nia korpo la plej preferinda. Por virinoj ĝi havos specialajn avantaĝojn, kiel ekz. sendolorajn naskojn!

Por flegantoj de la natur-nutrado interesa legaĵo, sed eble superflua ĉar jam antaŭ 40 jaroj oni en tiuj medioj asertis la saman; por amantoj de la „maletika” nutrado avertanta fingro!

R. S.

LA TRAGEDIO DE L'HOMO, drama poemo de Imre Madách. El la hungara tradukita de Kálmán Kalocsay, kun enkonduko de István Sötér. Eld. de Corvina, Budapest, 1965, 260 p., 14½ x 21 cm., bindita. Prezo: Us. dol. 2,20. Kolportisto: KULTURA, Budapest, P.B.149. Havebla ĉe nia Libroservo.

La verko estas jam konata de pluraj literaturamantaj esperantistoj, per sia unua eldono (1923), tradukita ankaŭ de Kalocsay.

Madách (1823-1864) estis tre meritplena hungara literaturisto. En sia ĉefverko „La tragedio de l'homo”, detala filozofia poemo, li priiraktis la sorton de l'homaro de ĝia estiĝo en la paradizo ĝis la nuna tempo, el pesimisma vidpunkto. La ĉefroluloj en la verko estas Adamo, Eva kaj Lucifero. En Adamo enkorpiĝis la prudento, en Eva la sento. En ĉiu grava epoko de la homa historio Adamo aperas en persono reprezentanta tiun epokon. Lucifero estas lia gvidanto, sed nur por ĉiufoje denove frakasi la esperon de Adamo.

La verko estas jam tradukita en pli ol 50 lingvojn. La nomo de la esperantista tradukinto garantias majstran tradukon. Per sia stilartista talento li sciis solvi la plej malfacilajn problemojn. Tiu ĉi eldono tamen diferencas plurilite de la unua; ĝi aperis en nova, reviziita formo, kion oni jam tuj konstatas renkontante pres-

kaŭ ĉiupaĝe novajn neologismojn. En la fino de la libro troviĝas listo de eĉ 58 neologismoj ankoraŭ ne troveblaj en P.V. La konstanta kreado de ne aŭ apenaŭ bezonataj novaĵoj ne estas pliriĝigo de Esperanto. El la mal-vortoj preskaŭ ĉiuj malaperis. Ofte la tradukinto skribis *damo* anstataŭ *sinjorino*; ĉu post *mal* nun venos la vico al *in* por malaperi?

Mi admiras la arton de Kalocsay konvene kaj trafe uzi verbojn formitajn el aliaj specaj radikoj kiel ekz. *feliĉi, sekuri, laci, amiki, frati, agrabli, soli, plejalti, dolĉi, sonorili* k.m.a., sed uzo de *kelk, mult, tiom* en senco de elementaj numeraloj ŝajnas al mi kripligo de vortoj. Kaj kial *re* kaj *dis* sen finaĵo *e*, sed *nure* kaj *ankaŭe* kun *e*? Ĉu ili esprimas ion alian ol *nur* kaj *ankaŭ*? Tia arbitro ne estas konsekvenca. Ankaŭ la nova eltrovaĵo *estiel* (identiga kiel) ne plaĉas. Ĝi estas ĵus proponita en la tria eldono de P.G., kaj en la nuna verko jam dek-dufoje eksperimente uzita. Mi ne povas subpremi la konjekton ke, se la verko ĝisvivos trian eldonon, Kalocsay surprizos nin per nova nombro da inventaĵoj, kiuj tiam montriĝos „necesaĵ”. Simile jam okazis en P.G. En la lasta eldono de P.G. la aŭtoroj diris i.a.: „... oni povas meti la senesceptan regulon, ke la subjunkcia *kvazaŭ* ĉiam postulas kondicionalon”. Malgraŭ sia propra regulo Kalocsay uzas ĉi tie indikativon: *kvazaŭ li mem ne eldiras* (p. 12). Aliapaĝe li skribis: *Sed per ĉi monumento de mi kreata*, kie li el itista vidpunkto nun certe preferus *kreita*. Ambaŭ formoj evidente traglitis la revizion.

Ankaŭ la arbitra manipulado de la artikolo ne plaĉas: *del, del, el l'obskur, la hieraŭ, la morgaŭ, la antaŭ* nomo de monato: *la Februaro, la Marto*. Same la nekutima uzo de akuzativo: *unun, tion ĝoji, tiel decas viron, tiel parolas pego vermon. Ĉi anstataŭ ĉi tiu* povas esti konvena helpilo en poemfarado kaj -tradukado; ĝi restu tamen nur helpilo kaj ne regule uzata formo. La tradukinto tamen uzis ĝin senescepte, eĉ *ĉi mia, ĉi sia*. Ni volonte agnoskas poetan liberecon, sed ĝi restu inter iaj limoj.

Eraraj estas *ne partoprenas ja en bataloj* = *kvankam ne ...* (9), kaj la vortkripligo *'stas* = *estas*. Evidente komposteraro estas *feliĉiĝa* = *feliĉiga* (45).

Fina konkludo: la traduko estas stila artverko, sed por la legantoj ĝi estus eĉ multe pli valora, se la tradukinto iom cedus

sian inventemon koncerne novaĵojn kaj neregulaĵojn. Esperanto ne estu tereno por troa eksperimentado, sed prefere por praktiki jam agnoskitajn regulojn.

G. J. D.

**ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRE-
LEGOJ** (Suplemento al Retoriko), de Ivo Lapenna. Rotterdam, 1966. Eld. de la aŭtoro. Kun enkonduko de G. Waringhien. 14½ x 21 cm., 152 p., bindita. Prezo: gld. 11,—.

Rekomendi la aŭtoron estas preskaŭ superflue. Preskaŭ ĉiuj, vizitintaj Universalan Kongreson, kaj multaj aliaj, devas lin koni kiel la plej grandan oratoron en la Esperantomovado. Lia stilo, pro kompleta uzado de la eblecoj de Esperanto kun ĝia libera vortordo, memorigas tiun de Cicero. Estus interesa eksperimento traduki kelkajn liajn paroladojn, ekz. la unuan, en Latinon.

La paroladoj kaj prelegoj ĉiuj temas pri Esperanto. Pro la gvidanta pozicio, kiun la aŭtoro okupis en la Esperantomovado, la libro estas ankaŭ grava fonto pri la historio de la Esperantomovado, precipe post la dua mondmilito. La ideojn gvidantaj la gvidantojn de la Esperantomovado oni trovas nenie esprimataj pli bone ol ĉi tie. Tre trafa komparo estas tiu de p. 56 de la Esperantomovado kun homo, kiu trenas ĉaron supren sur monto kaj devas streĉi la fortojn, nur por ke ĝi ne subenglitu. Kiel gvidantojn la Esperantomovado bezonas ne homojn, kontentajn teni la aferon funkcia, sed homojn daŭre strebantajn progresigi la aferon, kaj tia persono estas Lapenna!

Ankaŭ pri la ideologia fono de Esperanto, egalrajta kunlaborado de ĉiuj homoj, li parolas multe. Estas frapante, kiel profunde Zamenhof influis homojn multtrila-pli talentajn ol li mem!

D-ro W. A. Verloren van Themaat.

OPAVA kaj ĉirkaŭaĵo. Ilustrita faldfolio kun multaj informoj pri la ĉefa urbo, kie okazos ĉijare Esperantista Kultura Festivalo honore al Petr Bezruč (vidu p. 16 de tiu ĉi numero).

La faldfolio estas senpage (se eble kontraŭ 1 rpk.) havebla ĉe: Esperanto-rondeto de UK Ostroj, OPAVA, Na rybníku 27, Ĉeĥoslovakio.

Per la ĉisuba novelo - ŝajnice verkita en la jaro 2050 - d-ro W. A. Verloren van Themaat, Amsterdam, gajnis la premion „Nova Talento” en la Belartaj Konkursoj de UEA en 1964, dum la U.K. en Hago.

NEKROLOGO DE ESPERANTO

dediĉita al sinjoro Schmidt.

„Kaj eĉ se nia lingvo morgaŭ fariĝus mortinta, eĉ tiam kelkaj belamantaj skolestikuloj legus tiujn poemojn; kaj ili sufiĉus por malhelpi la enterigon definitivan de nia lingvo, kiel la poetoj de Romo certigas la neforgeseblecon de la latina lingvo”.

W. Auld, Enkonduko de „*Esperanta Antologio*”.

Jen nia nova mondfederacio, en kiu la paco estas sekurigita, kaj la lingva problemo por ĉiam eliminata!

Jes, mi naskiĝis anglo. Sed ne tial kedu, ke mi aprobas la solvon elektitan. Jam delonge la angla lingvo estis plej disvastigita. Pro la novaj metodoj de lingvodidaktiko la malnova argumento por la artlingvoj, la kvazaŭa troa malfacileco de la lingvoj naturaj, sian konvinkecon pli kaj pli perdis. Ŝajnis la plej grava argumento kontraŭ la akcepto de la angla lingvo kiel ununura mondhelplingvo la envio de la aliaj nacioj grandaj. Fine, per la leĝo de 2010, la monda parlamento, agnoskante la gravajn malavantaĝojn de pluraj mondhelplingvoj, igis la anglan lingvon ununura mondhelplingvo, ununura oficiala lingvo de la monda federacio kaj deviga lernobjekto por ĉiuj infanoj, sed por ne tro favori la anglalingvulojn samtempe devigis ĉiun anglalingvulon lerni unu el la aliaj gravaj lingvoj en la mondo. Nu, sub tiu reĝino kiel sesjara knabo mi elektis kiel duan lingvon la rusan. Poste mi iĝis profesoro pri la slavaj lingvoj.

Multajn lingvojn mi lernis. Kvankam ĉie mi povas helpi min per mia lingvo gepatra, mi vojaĝante ofte ŝatas paroli en la lingvo regiona.

Multajn literaturajn verkojn mi tradukis. Malgraŭ la oficiala anglalingveco nek al la anglalingvuloj, nek al la grandaj nacioj ni atribuas monopolion de kulturo. Ĉiu valoro kultura de ĉiu ajn popolo devas esti konatigita al ĉiuj, t.e. tradukita en la lingvon de ĉiuj, la anglan.

Multfoje, studante la influon de ideoj preskaŭ dekokajarcente raciismaj en la

ACĴTU VIAJN LIBROJN ĈE NIA LIBROSERVO!

Adreso: Libro-Servo L.E.E.N., Borniastraat 95, Leeuwarden.

landoj slavaj, kaj la unuan periodon de la komunismo, mi renkontis la nomon de lingvo, ofta portanto de tiuj ideoj: Esperanto. Mi memoris iam esti leginta en grandega internacia literaturhistorio, ke literaturo ekzistis ankaŭ en aliaj planlingvoj, sed nur en Esperanto vere granda. Tial fine la artlingvojn mi ekstudis. Pri Esperanto dum mia juna aĝo mi aŭdis nur mokojn. Ne plu Esperantaj kongresoj. Ne plu novaj adeptoj. Multaj esperantistoj ekzistis. Kelkajn el la multaj restintoj mi vizitis, kun ili eĉ parolis Esperanton. Ili estas murmurantaj maljunuloj, ĉiam parolantaj pri la pasinteco. Ili ankoraŭ korespondas inter si en Esperanto kaj eldonas malgrandan gazeton. Mortis Zamenhof, mortis Waringhien, mortis Lapenna, mortis la grandaj poetoj, aperis neniu simila. La lastaj adeptoj de afero perdita neniam imponas. En grandaj bibliotekoj mi legis iliajn historiojn de ilia lingvo. Sed la lasta el tiuj historioj aperis en 2008. Post 2010 verŝajne ne plu ekzistis sufiĉe da legantoj por povi eldoni librojn Esperantajn. Tial la informojn de tiuj libroj mi kompletigis per informoj ĉe la ankoraŭaj esperantistoj. En flavigintaj folioj de ilia gazeto, aperintaj post 2010, inter multaj banalaĵoj, mi trovis kelkajn poemojn de la lasta poeto Esperanta, Ludoviko Ganikolo.

Ilin superas nur malmulte la poemoj el la plej granda florada periodo de la literaturo Esperanta. Inter ili estas subluma elegio pri la baldaŭa morto de Esperanto Ganikolo ne estis sufiĉe naiva por atendi miraklon, kiu haltigus la pereadon de Esperanto, kaj subite kondukus ĝin al la ĝenerala enkonduko, kiun la esperantistoj esperis dum la florada periodo de la movado. Iom enigmaj restas tiuj versoj. Kial li verkis en lingvo, kies baldaŭan finon li mem sciis, kaj por nur kelkaj centoj da legantoj? Tion mi demandis al kelkaj esperantistoj, konintaj lin persone. Responde ili raportis al mi lian eldiron: „Ĉu oni ĉesus uzi sian gepatran lingvon, se oni sciis ĝian baldaŭan morton?” Kaj fakte ekzemple la versoj de Kalocsay aspektas kiel la verko de tre talenta poeto verkanta en sia gepatra lingvo. Ekzistas senin-

terrompa ĉeno de Zamenhof, verkanta „Mia penso” kaj „Ho mia kor” en lingvo konata de neniu, tra la kulminuloj de la florada periodo de Esperanto, ĝis Ganikolo verkanta la „Mortelegio de Esperanto”. Por ili Esperanto estis lingvo propra, kaj tial ili ĝin uzis, kiom ajn da homoj ĝin konis, kaj kion ajn ili atendis pri ĝia estonteco.

Mortajn lingvojn oni atendas trovi en enskriboj en rokoj, en roloj papirusaj en landoj de kulturoj malnovaj, jam delonge mortintaj. Sed jen mi trovis mortan lingvon vivantan inter ni, meze en civilizita Eŭropo, en proksima pasinteco. Jes, vivintan . . . Ĉiun lingvon mortan oni emas aprezi ĉefe laŭ ĝiaj ĉefverkoj literaturaj kaj tiaj, ĉar tiaj estas plej bone konataj. Tamen, pri morta lingvo nacia oni scias, ke plenvive ĝin uzadis multaj homoj ordinaraj. Sed Esperanto? Ni scias, ke kelkaj elstaraj verkistoj ĝin uzis preskaŭ kiel sian gepatran lingvon. Ni scias, ke ekzistis t.n. denaskaj esperantistoj. Sed la ordinaraj esperantistoj? Oni ne povas supozi, ke ili ĉiuj, nur kelkfoje korespondantaj, vizitantaj kongreson aŭ legantaj Esperantajn librojn aŭ revuojn, pensis kutime en Esperanto kvazaŭ en sia gepatra lingvo. Kaj tion atestas multaj eldiroj de iliaj gvidantoj.

Tamen, aliflanke ĝuste la kulminuloj ofte esprimis sian dankon al sia klubo, pro la ĉiama praktikado de la lingvo, kiu instigis ilin al tuta identigo kun la lingvo. Ĉu la Esperantomovado oni ne imagu simila al eklezio kristana aŭ budaisma, kies altajn idealojn nur malmultaj povas realigi plene, sed kies etoson larĝa homamaso konservas en siaj seriozaj intencoj kaj eĉ nur parta praktikado, atendantan sian disvolviĝon plenan en la homoj destinitaj? Ĉu ne la elitulojn de la esperantistaro nutris la kutimaj klubanoj, kiel la sanktulojn ofte iliaj piaj gepatroj, pastroj kaj popolo?

Mi ne estas esperantisto. Mi ne volas revivigi Esperanton, ne pli ol iu ajn studisto ekzemple de la lingvo malnovaj, kiom ajn admirante sian studobjekton, volas revivigi ĝin kiel larĝgaskalan komunikon. Sed mi volas doni al Esperanto la honoron, kiun meritas ĉiu popolo mal-

NEDERLANDA ESPERANTO-ASOCIO „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Prez.: S-ro H. Kervers, Van Slingelandtstraat 22, Den Haag.

Tel.: 0 70 - 54 21 86.

Sekr.: S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage.

Tel.: 0 70 - 66 96 69.

Kasistino: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort, (Z.).

Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de: Alg. Penningm. Ned. Esp. Ver.
L.E.E.N., Brederodelaan 36, Santpoort-Zuid.

KONCIZE

Ina Boudier-Bakker †

Je la 26-a de decembro 1966 mortis en Utrecht la konata Nederlanda verkistino Ina Boudier-Bakker.

S-ino Boudier naskiĝis je la 15-a de aprilo 1875-a en Amsterdam.

Ŝi estis talentita rakontistino pri la vivo de la bonhavaj klasoj.

Unu el ŝiaj verkoj, nome „Wat komen zal” (1904) estas tradukita en Esperanton de Tekla Flint kaj aperis kun la titolo „Surprizoj” kiel eldono de ISOSEK (Internacia Supera Skriba Esperanto-Kurso), presita ĉe A. K. Modersmaalet-Haderslev, Danujo.

Petr Bezruč (1867-1958).

En la jaro de la 100-datreveno de la naskiĝo de la elstara ĉefĉa poeto Petr Bezruč

granda: ke ĝiaj trezoroj kulturaj estu konataj al la tuta mondo. Tial mi entreprenis serion da tradukoj anglaj de la plej gravaj verkoj Esperantaj. El ili la jena volumo estas la unua.

Ofte tradukante mi demandis, ĉu ĉiu laboro de ĉi tiuj brilaj spiritoj ne estis vana. Al tiu ĉi lingvo ili dediĉis sian animon sian laboron, sian talenton, kelkaj sian genion. Kaj jen nun ĝi estas morta, ilia verko al preskaŭ neniu senpere atingebla. Ne . . . La etoso de frata, egalrajta kunlaborado de ĉiuj homoj, kiu inspiris la Esperantomovadon kaj kiun esprimis granda parto de la Esperanta literaturo, povas inspiri ankaŭ nin.

Jes, Esperanto mortis. Sed diru ne, ke ĝi mortis neniam vivinte.

W. A. Verloren van Themaat.

aperos kiel la 8-a numero de la serio „Oriento-Okcidento” la ĉefverko de Petr Bezruč: „Sileziaj Kantoj” en la esperanto-traduko de D-ro T. Pumpr, J. Korinek kaj R. Hromada.

Ĉe la „Památnik Petra Bezruče (Memordomo de Petro Bezruč) en OPAVA oni povas ricevi senpage esperantan broŝuron kiu pli detale informas pri la vivo kaj verko de la poeto. Vidu ankaŭ p. 16 de tiu ĉi numero.

Esperanto en Komercio - kvinlingva raportaro pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. Prezo: gm. 2,—, ekde 10 libroj gm. 1,35.

Esperanto-Rondo, 718 Crailsheim, Germanujo.

Helsingör

La internaciaj feriaj Esp.-kursoj okazos 23—30 de julio en la internacia Altlernejo (tute-modernigita) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Abyhöj, Danlando.

N.B. Aŭtunaj feriaj Esp.-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Arhus, Danlando, 15—21 de okt. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.

